

# *Gazeto*



# *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

## **CORTEGANA** **(Onubo)**



38-a Jarkolekto - Decembro 2024 - N-ro 135

**Oktobero / Decembro 2024**

## **Enhavo**

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.**  
**P. 07 Unu homaro, unu lingvo: la  
tristoplana historio de Volapuko**  
**P. 10 Lingva Angulo:**  
*El artículo LA*  
**P. 16 Poezia Angulo.**  
**P. 17 Nuntempa Vortaro:**  
*Ni bakas kukon.*  
**P.21 Folioj por Praktikado.**  
**P.26 Turismi en ...Cortegana (Onubo)**  
**P. 30 Notoj pri Esperanto kaj  
Andaluzio: Juan Antonio .  
Torres Galán. La majstra  
gitaristo.**  
**P. 34  $E=mc^2$  Scienca Angulo:**  
*Ni estas pli honestaj ol  
ni mem konsideras.*  
**P. 36 Flamenko:**  
*Zorongo.*  
**P. 38 Fervojista angulo:**  
*La trajno de la panistoj.*  
**P. 40 Komikso: Ili revenis.**  
**P. 47 Nun Ni. Junularaj Paĝoj.**  
**P. 49 Ŝako: Hispana malfermo.**  
**P. 51 Andaluzia kuirarto: Terpomoj  
kondimentitaj laŭ la kadiza stilo**  
**P. 53 Misteroj kaj Legendoj de  
Andaluzio:**  
*La granadaj infantinoj.*  
**P. 56 Vorto-ludoj.**

## **Gazeto Andaluzia**

*Fundada por D. José Garzón Ruiz,  
en San Fernando (Cádiz) en 1910.  
Órgano oficial de la Asociación  
Andaluza de Esperanto.*

EDITA: Asociación Andaluza de  
Esperanto  
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D  
29013 Málaga (Hispanio)  
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.  
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López  
REDACTORES:  
José María Rodríguez Hernández  
Alejandro Burgos Escalante



*Sur la kovrilo:  
Vidaĵo de Cortegana (Onubo)*



# ESPERANTO EN ANDALUZIO

## Eksterordinara Ĝenerala Asembleo de A.E.U.

La pasintan 23an de decembro okazis eksterordinara ĝenerala asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Lastatempe ĉi tiuj renkontiĝoj okazas per-rete. Unu el la ĉefaj decidoj de la asembleo estis la nomumo de nova estraro por la andaluzia asocio, kiu laboros ĝis la fino de 2026. Jen ili:

- Prezidanto: Ángel Arquillos López.
- Vic-prezidanto: Alejandro Burgos Escalante.
- Sekretario: José María Rodríguez Hernández.
- Kasisto: Carlos G. Spinola.
- Voĉdonantoj: Juan Díaz Casado.  
Alejandro Pinos Cabello.  
Yusef Hamdi el-Farouki.

## Nova numero de la revuo *VENTO*

Post kelkjara silento, aperis en aprilo 2025 nova numero de la revuo *VENTO*, la sola en esperanto kiu pritraktas aferojn rilatajn al veksilologio, aŭ flagoscienco. La revuo estas libere legebla ĉe [www.esperanto.ac/vento](http://www.esperanto.ac/vento). Ĝi estas eldonata de interesitoj pri la studo de flagoj kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Laŭ informo aperanta sur la revuo, oni planas la laŭleĝan fondiĝon de V.E.N.T.O., akronimo de Veksilologia Esperanta Tutmonda Organizo. Ĉi tiu grupo volas esti faka asocio de la E-movado por flag-amantoj. Se tiel, ĝi estos tutmonda E-organizaĵo, eĉ se malgranda, kun sidejo en Andaluzio.



## Slovena E-paro vizitis Sevilon



→ Antonio Romero, Luiso Gilpérez, Vesna kaj Vladimir Obradovic

De la 6-a ĝis la 16-a de februaro slovena paro vizitis Sevilon. Temas pri Vesna kaj Vladimir Obradovic, ili estas "edzperanta" paro, tio estas ili konatiĝis per esperanto, Vesna estas slovena kaj Vladimir rus-devena. Ili sufiĉe bone konis la urbon, pro la fakto, ke la gepatroj de Vesna iam loĝis en Sevilo post sia emeritiĝo. En ĉi tiu vizito ili kontaktis kun la sevila esperantistaro.

## ZEO-j en Andaluzio

La hispano José Antonio del Barrio estas la nova komitatano por ZEO-j, sed kio estas ZEO? Zamenhof/Esperanto-objekto, mallongigite ZEO, estas objekto nomita honore al la aŭtoro de la internacia lingvo, L.L. Zamenhof, aŭ al la lingvo mem. Ĉi tiu akronimo estis kreata de Hugo Röllinger en lia libro "Monumente pri Esperanto". Li, en la jaro 1997, raportis pri 1044 ZEO-j en 54 landoj. Nun, Universala Esperanto-Asocio konfidis la aferon registri la ZEO-jn tutmonde al José Antonio del Barrio, kies unua tasko estas komplete elnombri ĉi tiujn objektojn.

Kiom da ZEO-j troviĝas en Andaluzio? Unuavide, jen ili, kvankam ne temas pri kompleta listo, verŝajne aperos kelka plia:

- Ŝipo "Esperanto" registrita en Malago en la jaro 1896, krome oni povas aserti, ke ĉi tiu ŝipo estis la unua ZEO en la mondo.
- Strato "Esperanto" en Malago.
- Avenuo "Esperanto" en Torokso (Malago).

- Strato "Esperanto" en Motril (Granado).
- Strato "Esperantista Pedro Naranjo Terán" en Jerezo.
- Dom-konstruaĵo "Esperanto" en Torokso (Malago).
- Strato "Esperanto" en Alhaurín de la Torre (Malago).
- Trinkejo "Esperanto" en Malago.
- Trapasejo "Esperanto" en Malago.
- Kliniko bestkuracista "Esperanto" en Malago.
- Tomboŝtono de Tomás Caspe Cereijo en Sevilo, kun esperantista simbolo kaj teksto en la internacia lingvo.
- Memortabulo en biblioteko de Antekero (Malago), omaĝe al esperanto-verkisto Higinio García.
- Speciala vario de akvomelono kun la nomo "Esperanto", kreita de la agrokultura kompanio *Diamond Seeds* en Almerio.



Ŝipo "Esperanto" unua ZEO en la mondo. Registrita en Malago en la jaro 1986

**Nova ret-adreso de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**

**[info@esperanto.ac](mailto:info@esperanto.ac)**

## REAKTIVIĜIS LA BANKO-KONTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Post kelkaj problemoj kun la banko okaze de la administrado de nia banko-konto, ni plezure informas al niaj membroj kaj simpatiantoj, ke la banko-konto:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Reaktiviĝis!

Se vi apogas kaj deziras kunlabori kun la Esperanto-movado en Andaluzio, ni proponas al vi membriĝi en Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La jara kotizo estas 20 €, pageblaj en tiu banko-konto. Ni petas al vi, post la pago, sendi ret-mesaĝon al [info@esperanto.ac](mailto:info@esperanto.ac), por informi pri la pagita kotizo. Multan dankon kaj ni kalkulas kun via kunlaborado.



## VUELVE A ESTAR ACTIVA LA CUENTA DE LA ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO

Después de algunos problemas con la entidad bancaria por la gestión de nuestra cuenta bancaria, anunciamos a todos nuestros socios y simpatizantes que la cuenta:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

¡ Vuelve a estar activa !

Si apoyas y quieres colaborar con el movimiento esperantista en Andalucía, te invitamos a hacerte miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto. La cuota anual es de 20 €, que puedes abonar en la cuenta antes indicada. Te rogamos que tras hacer el pago envíes un correo electrónico a [info@esperanto.ac](mailto:info@esperanto.ac), informando del abono de la cuota.

Muchas gracias y contamos con tu colaboración.

# VOLAPÜK

*Unu homaro, unu lingvo:*

## *la tristoplena historio de Volapuko*

púbom balna in mul, ko  
flane 16 in fom epadafolüfa.

1887.

Balul — Nüm. I.

Boned yelik in Spän, 3 ptaa  
Se Spän: frans fol.

### ENKONDUKO

Estas de ĉiuj sciante, ke volapuko (propralingve: volaptük) estas artefarita lingvo, kiel Esperanto. La nomo de la lingvo venas de «vol» (mondo) kaj «pük» (lingvo), do, mondlingvo. La historio de volapuko komencas en la jaro 1879, kiam Johann Martin Schleyer, germana katolika pastro, konigis al la mondo sian propran internacian lingvon pere de skizlibroj en multaj lingvoj, kiel latino, la hispana, la germana aŭ la itala. En la unuaj libroj, la germana pastro diskonigis la bazojn de sia lingvo, precipe la abocon kaj kelkajn bazajn vortojn kaj frazojn. La lingvo rapide populariĝis kaj estis starigitaj kluboj kaj volapuklernejoj ĉie en la mondo. Okazis kelkaj internaciaj kongresoj en la 1880-aj jaroj kaj kelkaj regulaj revuoj estis publikigitaj en volapuko. Kiel en Esperanto, oni starigis akademion, la Internacian Akademion de Volapuko (propralingve: Kadäm bevünetik volapüka) en la jaro 1887, la naskiĝjaro de nia lingvo.

La ĉefo de la akademio estas la ĉifalo (propralingve: cifal). Ĉio iris glate, tamen ĉio ĉi evaporigis tre baldaŭ. En la lastaj jaroj de la 1880-aj jaroj, estis proponoj pri reformoj de la lingvo, ĉar volapuko estis ja ne facila lingvo por kelkaj mondanoj. Schleyer estis tre aŭtoritata figuro kaj volis fari nenian reformon. La konsekvenco estas klara: skismo en la movado. Multaj volapukistoj transiris al la ĵus naskita Esperanto kaj aliaj elpensis novajn lingvojn.



Johann Martin Schleyer  
1831 ~ 1912

## VOLAPUKO II. Reformoj kaj en la movado kaj en la lingvo

En la jaro 1931, la nederlanda doktoro Arie de Jong reformis la lingvon kaj publikigis gramatiklibron kaj vortaron. Ĉi tia volapuko estas la nuna formo parolata de volapukistoj. La volapukmovado, pro ĉi tiu reformo, renaskiĝis momente, sed la enpotencigo de naziismo en Germanujo preskaŭ fordetrus la movadon. Post la dua Mondmilito, volapuko iĝis nura kuriozaĵo por lingvistoj.



Simbolo de la lingvo Volapuko.

La uzo de kaduceo, atributo de la dio Merkuro, simbolo de la komerco, evidentigas la celon mem de la lingvo.

## NUNTEMPO

Nun restas nur kelkdekaj entuziasmaj volapukparolantoj. «La Akademio tute malaperis, kune kun la multaj ekzamenoj kaj honoroj (medaloj, diplomoj); landaj asocioj ankaŭ [*sic*] malaperis, kune kun kluboj kaj kunvenoj» (Midgley, 2000). Malgraŭ ĉio, kion diris la administranto de la volapuka movado Ralph Midgley, ankoraŭ ekzistas ĉifalo (Hermann Philipps) kaj grupoj en Facebook, Reddit kaj Discord pri la lingvo mem. Oni ĉiumonate publikigas la revuon *Vog Volapŭka* (en Esperanto: La voĉo de volapuko) kaj, de tempo al tempo, ediktojn de la ĉifalo kaj vicĉifalo. Nuntempe, tamen, volapuko estas rigardata ne kiel internacia lingvo, sed konservenda kultura heredaĵo.

Vi povas konsulti lernilojn en la jena retpaĝo: <https://mallonge.net/1k4>

	<b>VÖG VOLAPÜKA.</b>
	,Daniil Morozov': redakan ä vicifal, ,shido2308@yahoo.com', ,Ekaterinburg', ,Rossija' / Rusän.
<b>Jäfidot soĝa bevünetik Volapüka.</b>	
<b>YELOD 35<sup>id</sup>.</b>	<b>NÜM: 2. 2025 FEBUL. PADS: 9 jü 16.</b>

Gazetkapo de *Vög Volapüka*

## PRAKTIKAJ EKZEMPLOJ DE LA NUNA VOLAPUKO.

El jena retpaĝo: <https://mallonge.net/1k3>

Volapuko: *Glidis! Binob studan in niver. Fat obik binom büsidan. Mot obik binof tidan.*

Esperanto: Saluton! Mi estas studanto en universitato. Mia patro estas entreprenisto. Mia patrino estas intruistino.

Se vi volas aŭskulti volapukon, bonvolu spekti jenan filmeton de flua volapukisto: <https://mallonge.net/1k5>

## REFERENCOJ

Daniil Morozob (6 de aŭgusto de 2024) *Poezia na volapiuke. Ĉast 1 (poedot fa Hotz)* [filmeto]. <https://mallonge.net/1k5>

Midgley, R. (2000). Volapük hodiaŭ. *Informilo por interlingvistoj*, 2/2000(33), 1-3.

## BIBLIOGRAFIO

Martin, S (1883). *Lingua universalis, excogitata per Johannem Martinum Schleyer*. Eldono de la aŭtoro.

ZEIT ONLINE (10 de mayo de 2024). *Warum die Weltsprache VOLAPÜK vergessen wurde -und was das mit DUNE und Game of Thrones zu tun hat* [filmeto]. <https://mallonge.net/1k6>

Verkis: Alejandro Burgos Escalante ([alejandroabe@proton.me](mailto:alejandroabe@proton.me))



Quizá sea lo primero que se aprende cuando se hojea un método de esperanto. En la lengua internacional solo existe un artículo, el determinado *LA*, que no varía ni en género ni en número. No existe el artículo indeterminado.

El artículo *LA* corresponde a los artículos en español «el, la, los, las». Es decir, lo utilizaremos ya sea en singular o en plural, en femenino o en masculino.

<i>La libro</i>	<i>La libroj</i>	<i>La patro</i>	<i>La patrino</i>
El libro	Los libros	El padre	La madre

Aunque su uso puede parecer muy simple y sencillo, hay que tener en cuenta algunas cuestiones. En primer lugar hay que saber que el artículo *LA* se refiere siempre a algo que es conocido por quienes intervienen en la conversación. Así:

*Mi legis la libron*      En esta frase tanto quien la dice como quien la escucha  
Yo leí el libro                      saben de qué libro se trata.

Si dijéramos *Mi legis libron* (yo leí un libro) no necesariamente se sabe qué libro es, ya que no está determinado.

**Usaremos el artículo *LA* cuando el nombre al que acompañe sea conocido en la conversación.**

¿Cuándo no usaremos el artículo *LA*?

- En primer lugar no lo usaremos cuando acompañe a un nombre propio.

No es correcto decir *Mi vizitis la Italion*, sino *Mi vizitis Italion*.

Tampoco es correcto preguntar *Kie estas la Aleksandro*? Diríamos simplemente, *Kie estas Aleksandro*?

Sin embargo, si el nombre propio viene precedido de un título o un cargo, entonces sí se usa *LA*, ej.:

*La reĝo Filipino vizitis en Romo la papon Franciskon.*

El rey Felipe visitó en Roma al Papa Francisco.

En este ejemplo el artículo *LA* realmente acompaña a *reĝo* y a *papo*, no al nombre propio. Por cierto, y hablando de reyes y papas, para expresar el numeral que le corresponde en el título sí se utiliza *LA*, ej.:

La papo Francisco la unua.

La reĝo Filipino la sesa.

El papa Francisco primero.

El rey Felipe sexto.

Por pura lógica, esta prohibición de usar *LA* junto a un nombre propio tiene una excepción. Se trata del caso en que queremos distinguir entre nombres propios con la misma denominación. Así:

*Mi vizitas ofte la urbon Kordovon en Hispanio, la Kordovo en Ameriko estas tre malproksime de ĉi tie.*

Yo visito a menudo la ciudad de Córdoba en España, la Córdoba en América está muy lejos de aquí.

También se utiliza la preposición *LA* delante de aquellos nombres propios que incluyen en su denominación el plural, ej.:

*Maĉupikĉuo estas inkaa urbo kiu troviĝas en la Andoj.*

Machu Pichu es una ciudad inca que se encuentra en los Andes.

*En la Filipinoj multaj homoj ankoraŭ parolas la hispanan lingvon.*

En las Filipinas muchas personas todavía hablan la lengua española.

• Tampoco usaremos el artículo *LA* cuando el sustantivo quede definido exactamente por otra palabra, como este, ese, aquel, ninguno, ambos, etc. Es decir, no es necesario determinar dos veces un mismo sustantivo. Veamos algunos ejemplos:

*Tiu domo estas belega.* No se diría: *La tiu domo estas belega.*  
Esa casa es bellísima

*Mi legis ambaŭ librojn* No se diría *Mi legis la ambaŭ librojn.*  
Yo leí ambos libros

Cuestión distinta es si el sustantivo viene definido por un posesivo. Así, si en la frase el sustantivo ya queda determinado por el posesivo, ejemplo:

*Via aŭtomobilo estas tre rapida.*  
Tu coche es muy rápido.

En este caso no se diría *La via aŭtomobilo...* porque ya ha quedado determinado con exactitud, gracias al posesivo *via*, de qué coche se trata, es decir del tuyo.

Sin embargo, si omitimos en la conversación ese sustantivo, porque lo damos por supuesto, entonces sí podemos utilizar el artículo *LA*. De este modo:

*Via aŭtomobilo estas tre rapida, sed la mia ne.*  
Tu coche es muy rápido, pero el mío no.

Vemos como en la primera frase no se podría utilizar el artículo *LA* porque se define el objeto como el posesivo *VIA*, pero en la segunda, al omitirse el objeto, porque se sobreentiende, entonces sí podremos utilizar el artículo *LA*.

• Tampoco usaremos el artículo *LA* cuando actúe como vocativo, es decir para llamar o interpelar a alguien, ej.:

*Doktoro, venu kiel eble plej rapide!*  
¡Doctor, venga lo más rápido posible.!

No decimos: *La doktoro...!*

• Tampoco debe usarse la preposición *LA* para los días de la semana, los meses del año o las fiestas. Aunque si nos referimos a un día concreto que va acompañado de un adjetivo sí puede usarse, Ejemplos:

*Dum Kristnasko mi vizitos miajn gepatrojn.*  
En Navidad visitaré a mis padres. (No decimos "*dum la Kristnasko*")

*Sabate, mi neniam laboras.*  
Los sábados nunca trabajo. (No decimos "*la sabatojn*").

Aunque si queremos especificar un día, mes o fiesta en concreto sí podemos usar *LA* para acompañar al adjetivo que lo especifica. Ejemplo:

*La venontan sabaton mi devas labori.*

El próximo sábado debo trabajar.

*Dum la proksima Kristnasko mi restos hejme.*

Durante la próxima Navidad me quedaré en casa.

• Por último, el artículo *LA* tampoco debe usarse para referirse a especies animales o vegetales en su conjunto. Por ejemplo:

*Leono estas sovaĝa besto.*

El león es un animal salvaje.

*Rozoj estas bonodoraj floroj.*

Las rosas son unas flores que huelen bien.

Sin embargo, si nos referimos a uno o un grupo de individuos de esa especie sí utilizaríamos el artículo *LA*.

*Elefantoj estas bestoj kun grandaj orejoj, tamen la orejoj de la elefantoj en Azio ne estas tiel grandaj, kiel tiuj de la elefantoj en Afriko.*

Los elefantes son animales con grandes orejas, sin embargo las orejas de los elefantes de Asia no son tan grandes, como las de los elefantes de África.

Veamos ahora unos usos especiales a tener en cuenta cuando utilices el artículo *LA*.

• Si nos referimos a un conjunto de cosas o personas, colocaremos el artículo antes del adjetivo "TUTA". Los hispano-parlantes solemos traducir al esperanto la expresión "todos los amigos", por su literal "*tutaj la amikoj*". Sin embargo, lo correcto es "*la tutaj amikoj*". Así:

*Mi rapide legis la tutajn paĝojn de la libro.*

Leí rápidamente todas las páginas del libro.

*Ŝi invitis al festo la tutajn familianojn.*

Ella invitó a una fiesta a todos los familiares.

Aunque hay que advertir que lo más usual en estos casos es utilizar "*ĉiuj*"


*Ŝi invitis al festo ĉiujn familianojn.*

## Cuando nos referimos a "TODOS LOS..." en esperanto decimos "LA TUTAJ..."

- Cuando nos referimos al superlativo, ya sea de superioridad o de inferioridad, dado que se trata de algo único, usaremos el artículo *LA*. Algunos ejemplos:

*Mia amiko estas la plej inteligenta lernanto en la Universitato.*  
Mi amigo es el alumno más inteligente de la Universidad.

*Testudo estas unu el la plej malrapidaj bestoj.*  
La tortuga es uno de los animales más lentos.



Kiu estas *la plej rapida*? Ĉu testudo aŭ ĉu leporo?  
Leporo estas pli rapida ol testudo, tamen *la* testudo aperanta sur la bildo  
estas pli rapida ol *la* leporo.

Para terminar con el estudio del artículo determinado *LA* hay que recordar, que la regla nº 16 del Fundamento de Esperanto permite suprimir la terminación "a" del artículo y sustituirla con un apóstrofe ( ' ). Aunque no se diga nada en esa regla al respecto, el uso de esta elisión es casi exclusivo de la poesía. Veamos algunos ejemplos:

*L'espero, l'obstino kaj la pacienco  
jen estas la signoj per kies potenco.  
Ni paŝon post paŝo, post longa laboro,  
atingos la celon en gloro.*

*Post longa migrado sur dorna la voj'  
Minacis nin ondoj de l' maro;  
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'  
Al verda haven' de l' homaro.*

Sin embargo, no resulta muy recomendable usar esta elisión cuando la palabra siguiente comienza por vocal "a", ya que podría inducirse a error. Así:

<i>l'afero</i>	podría confundirse con	<i>la fero</i>
la cuestión		el hierro

**En esperanto se permite la elisión de la "a"  
final en el artículo por medio de un apóstrofe.**

*Esperanto, l' internacia lingvo.*

Este uso del artículo con apóstrofe dio lugar a la creación en el año 1890 por el autor esperantista polaco Antoni Grabowski, de la expresión "l'o", que se traduce precisamente así en español también "lo", y aunque apenas se usa en el esperanto diario, sí hay que reconocer que es correcto. Veamos algunos ejemplos:

*L'o plej malbona estas kuri kaj ne lukti.*

Lo peor es correr y no luchar.

*L'o dezirinda estas vivi trankvile.*

Lo que es digno de desear es vivir tranquilamente.

Esta forma del adjetivo con apóstrofe, al que se añade la terminación "o" de los sustantivos, se puede expresar también con el demostrativo "tio".

*Tio dezirinda estas vivi trankvile.*

Eso digno de desear es vivir tranquilamente.





## La krim' en Granad' okazis

### 1. La krimo

Oni vidis lin marŝanta  
inter homoj kaj fusiloj  
tra tre longa frida strato  
eliri al kamp' sen miro,  
ankoraŭ la steloj brilis  
venis haste la ektagiĝo.  
Kiam la orsun' eklumis  
oni murdis Federicon.  
Ne kuraĝis lin rigardi  
la grup' de ekzekutistoj  
ĉiuj fermis la okulojn  
preĝis: "savas vin nek Dio!"  
Sango sur la frunt' kaj ventro  
morta falis Federico.  
La krim' en Granad' okazis,  
ho, terura malfeliĉo!  
sciu estis en Granado-  
la Granad' de Federico!

"*La krim' en Granad' okazis*" estas poemo de **Antonio Machado**, verkita tuj post koni la novaĵon pri la murdo de la poeto Federico García Lorca en Granado, en la komenco de la civila milito. La poemo havas 3 partojn: *la krimo*, *la poeto* kaj la lasta sen titolo. Antonio Marco Botella en esperanton tradukis ĉi tiun unuan parton, tie oni priparolas la antaŭajn momentojn al la murdo kaj la ĝustan momenton kiam la poeto estis morpafita.

## Ni bakas kukon



Blanka sukero  
Bruna sukero  
Rafinita sukero  
Glacigita sukero



Kakao kaj ĉokolado



Mielo



Butero




Meringo



Marmelado el frago



Melaso




Pesilo



Faruno



Lakto  
Lakto el sojo  
Lakto el migdalo



Densigita lakto




Pulvora fermento



Taso



Kulero



Muldiloj




Rulo



Kolorigiloj



Gelateno



Margarino



Kandizita frukto



Oleo



Karamelo



Vanilo



Ĉokolada bombono




Jogurto



Biskvito



Braŭnio



Kafo



Šovelilo



Rultrançilo



Kirlofasko



Kirlomašino



Bakujo /  
Bak-forno



Nugato



Brioço



Madeleno



Ŝaŭmaĵo



Korna  
bulko



Hidrokarbonato



Peniko



Bakaĵsako



Kremo



Siropo



Pudingo



Marcipano



Zingibro



Pralino



Aluminia folio



Torto



Merizo sur kuko



Polvumilo



Anizo



Ĉokolada stangetoj



# Folioj por praktikado

## Afrikanoj antaŭ la interreto

En la silento de nokto, **ĉirkaŭ** fajro, avo sidas inter junaj geknaboj. Per voĉo mallaŭta kaj **plena je mistero**, li rakontas la historiojn de pasintaj tempoj...

**Antaŭ** la interreto, antaŭ la telefonoj kaj ekranoj, la afrikaj vilaĝoj estis **riĉaj je** aliaj formoj de komunikado kaj interŝanĝo de scioj. En tiuj tagoj, sciado kaj **saĝeco** pasis de generacio al generacio per la voĉo de **la plej aĝaj, kies memoroj** estis kiel vivantaj libroj.

**Ĉiunokte**, kiam la suno foriris kaj la **nokto sin kovris per brilantaj steloj**, la vilaĝanoj kunvenis ĉirkaŭ fajro. Tie, ĉirkaŭ la fajro, la **saĝuloj** malfermis la trezorojn de la pasinteco. **Ili rakontis pri la kreado** de la mondo, pri la unuaj plantoj kaj bestoj, pri **la unua viro kiu lernis kiel forĝi feron**, kaj pri la virino kiu malkovris la magion de kurac-herboj. **Rakonte kaj kante**, la saĝuloj instruis pri la mondo, pri amikeco, honoro, kaj kuraĝo.

En la mondo antaŭ la interreto, ĉiu persono havis sian rolon en la vilaĝo. **Kiam venis nova sezono**, la viroj ĉasis **kune**, la virinoj rikoltis, kaj la infanoj lernis pri la naturo. Ĉion ili dividis – **de manĝaĵoj ĝis scio**. La lernado okazis per observado kaj aŭskultado, dum la pli aĝaj instruis per ekzemplo.

### > ĉirkaŭ

Se trata de la preposición "alrededor de". De esta preposición podemos también formar una familia de palabras, ejemplos:

- *Ĉirkaŭaĵo*: lo que está alrededor.
- *Ĉirkaŭi*: rodear. • *Ĉirkaŭtranĉi*: cortar siguiendo un contorno exterior.

### > plena je mistero

Se traduce por "lleno de misterio". Podemos utilizar para indicar esta idea tanto la preposición "je" como "de", ambas son válidas.

### > Antaŭ

Ya conocemos la preposición "antes de", tan solo recordar ahora que no es necesario añadirle la preposición "de", ya que "antaŭ" por sí solo ya indica "antes de". Solo habrá que añadirle la preposición "ol" cuando antecede a un verbo o a una frase. Ejemplos:

- *Pensu, antaŭ ol paroli.* (Piensa, antes de hablar).
- *Informu min antaŭ ol vi venos.* (Infórmame antes de que vengas).

### > riĉaj je

Se traduce por "ricos en...". Para indicar en qué sentido se es rico, especialmente cuando se trata de valores y no de cosas, se utiliza la preposición "je". Veamos algunos ejemplos:

- *La vojaĝo ŝajnas riĉa je aventuroj.* (El viaje parece rico en aventuras).
- *La instruado de la profesoro estas riĉa je sciado kaj principoj.*  
La enseñanza del profesor es rica en conocimiento y principios.

### > saĝeco

Recordemos que el sufijo "-ec" expresa una idea abstracta relativa a la raíz. Ejemplos:

- *saĝa*: sabio            *saĝeco*: sabiduría.
- *libera*: libre            *libereco*: libertad.
- *amiko*: amigo            *amikeco*: amistad.

### > la plej aĝaj

Se traduce por "los que tienen más edad". No necesariamente da la idea de vejez, porque entonces se habría dicho "*la plej maljunaj*". Vimos en el apartado de gramática unas páginas antes, que los superlativos siempre van con el artículo determinado "la".

## > kies

Ya hemos visto en alguna ocasión que el cuadro de voces simples forma palabras gracias a una raíz y a una terminación. En este caso la raíz es "KI", que indica pregunta o encabeza una frase subordinada relativa. El final "ES" indica propiedad, pertenencia. Se traduciría por "cuya, de la cual". Ejemplos de su uso:

- *Mia avo, kies memoro estas tre bona, konas la datrevenojn de siaj tutaj nepoj.*  
Mi abuelo, cuya memoria es muy buena, conoce los cumpleaños de todos sus nietos.
- *La libro, kies komenco estas alloga, fine tediĝas.*  
El libro, cuyo comienzo es encantador, al final se hace aburrido.

## > Ĉiunokte

Anteponer el morfema "ĉiu" a una palabra da la idea de colectividad, sin excepciones. Puede ir separado del nombre al que acompaña, o como en este caso unido y formando un adverbio. Ejemplos:

- *Ĉiu homo estas mortema.* (Cada hombre es mortal)  
Se podría decir también: *ĉiuj homoj estas mortemaj* (todos los hombres son mortales).
- *Ŝi ellitiĝas ĉiutage je la kvina horo.*  
Ella se levanta de la cama cada día a las cinco.

## > nokto sin kovris per brilantaj steloj

Se traduce por "la noche se cubrió con estrellas brillantes". En primer lugar hay que indicar, que en esperanto hay dos maneras de formar el reflexivo de los verbos:

- 1) utilizando el sufijo "iĝ", *kovri* (cubrir) *kovriĝi* (cubrirse).
- 2) Usando el pronombre personal como objeto directo (en acusativo):

<i>Mi kovras min</i>	<i>Vi kovras vin</i>	<i>Li/Ŝi kovras sin</i>
Yo me cubro	Tú te cubres	Él/Ella se cubre

Recordemos que el pronombre que actúa como objeto directo o como posesivo, cuando se trata de la tercera persona y se refiere al sujeto es "si".

Por último hay que reseñar en esta frase la función de la preposición "per". En español habríamos usado "con" (cubrir con brillantes estrellas), sin embargo

en esperanto "*kun*" expresa la idea de compañía, mientras que "*per*" lo utilizamos cuando queremos expresar de lo que está compuesto algo, o lo que utilizamos para hacer algo. Veamos algunos ejemplos:

- *Plenigu la botelon per freŝa akvo!*  
¡Llena la botella con agua fresca!
- *La rakonto ŝajnas ne-kredebla, tamen mi vidis ĉion per miaj propraj okuloj.*  
La historia parece increíble, sin embargo yo lo vi todo con mis propios ojos.

### > saĝuloj

El sufijo "*ul*" indica que una persona se caracteriza por el adjetivo que indica la raíz. Ejemplos:

- *saĝa*                    *saĝulo*  
sabio                    una persona sabia.
- *alta*                    *altulo*  
alto                    una persona alta.

### > Ili rakontis pri la kreado

Recordemos cuando hablamos, escribimos o tratamos "de" algo, realmente lo hacemos "sobre" algo. Este es el sentido de la preposición "*pri*", cuyo significado es "de, sobre" pero referido a un tema. Ejemplos:

- *La prelego temis pri historio de la muziko.*  
La conferencia trató sobre historia de la música.
- *Mi ne povas opinii pri via amiko, ĉar mi ne konas lin.*  
Yo no puedo opinar sobre tu amigo, porque no lo conozco.

### > la unua viro kiu lernis kiel forĝi feron

Al igual que vimos antes en el caso de "*kies*" (cuyo), "*kiu*" y "*kiel*" también son dos palabras que siguen la misma estructura:

*KI* (pregunta o relativo)    *U* (persona)    *EL* (modo)

Así *KIU* significaría "quién, el cual" y *KIEL* "cómo" o "de qué modo".

La traducción de la frase que aparece en el texto sería: "el primer hombre que aprendió cómo forjar el hierro". Veamos algunos ejemplos más:





Situata meze de la Siero de Araceno, la vilaĝo Cortegana (prononcu: Kortegana) troviĝas norde de la provinco Onubo. Tie elstaras vastaj paŝtejoj kaj leĝeraj montetoj kovritaj de korko-kverkoj. Nombraj riveretoj havigas al ĉi tiu zono ne-kompareblan belecon.

Laŭ historiistoj, jam 2000 jaroj a.K., dum la Ĥalkolitiko, ekzistis malgrandaj setlejoj en la zono. Tie aperis tombejoj kun ornamajoj apud dolmenoj. Dum la romia epoko Cortegana fariĝis vilaĝo, kies enloĝantoj sin okupis pri terkulturado kaj ekspluatado de kupraj kaj feraj minejoj.

Proksime trakuris romia vojo, kiu komunikis ĉi tiun zonon kun la luzitana Beja. Laŭ esploristoj, la romia vilaĝo nomiĝis Corticata, jam priskribita de la greka geografo Ptolomeo. Tamen, lastaj esploroj metas en dubon ĉi tiun aserton. Aliaj historiistoj diras, ke la nuntempa Cortegana estis la islama Cartasana, vilaĝo dependanta de la sevila islama regnolando. Dum luktoj inter la kristanaj regnoj de la Ibera Duoninsulo, ĉefe Kastilio kaj Portugalio, kontraŭ islamanoj, Cortegana estis disputita inter la kastilia kaj la portugalaj reĝoj. Fine, laŭ traktato subskribita en Badaĥozo en la jaro 1267, Cortegana restis sub la povo de la kastilia regnolando.



Blazono de Cortegana

Inter la 13a kaj la 15a jarcentoj, kastilianoj konstruis kastelon, kun la celo protekti la vilaĝon de eblaj portugalaj atakoj. La abundo de akvo kaj paŝtejoj ebligis la alvenon de nova enloĝantaro, tiel naskiĝis novaj setlejoj apud Cortegana, ĉiam ĉirkaŭ naturaj akvo-fontoj. Tamen, dum la 17-a jarcento, la oftaj luktoj inter Kastilio kaj Portugalio senpopoligis la tutan zonon. Pro tio alvenis novaj enloĝantoj, soldatoj kiuj devis esti gastigitaj de la Cortegana-anoj. Ĉi tiu

reĝa devo ebligis impostan pag-escepton al la vilaĝo. Dum la eltrovo kaj konkero de Ameriko, nova ekonomia viv-rimedo aperis en Cortegana, temis pri porko-bredado kaj ellaborado de porkaĵoj, kiuj estis senditaj al la nova kontinento. Kompreneble, la alta kvalito de tiuj porkaĵoj diskonigis sin tra la tuta regnolando.

Meze de la 19-a jarcento aperis nova industrio en la vilaĝo: la korko-produktado. Boteloj de vino kaj likvoroj uzis la korkon produktitan en Cortegana por siaj ĉapoj. Tiel, la abundaj korko-kverkoj de tiu zono provizis vin-produktantojn ne nur de Hispanio, sed ankaŭ de Francio. Naskiĝis tiam industria burĝaro en la urbo. En tiuj jaroj ankaŭ minejoj komencis esti ekspluatataj, tio ebligis la konstruon de fervoja stacidomo.

Dum la 20-a jarcento la ellaborado de porkaĵoj fariĝis pli grava, ĉefe kiam dum la 1980-aj jaroj la minejoj fermiĝis. Nuntempe Cortegana estas vilaĝo kun 5000 enloĝantoj, kies plej grava ekonomia rimedo estas la bredado kaj la ellaborado de porkaĵoj.

## Monumentoj

### Paroka preĝejo de La Dia Savinto.

Ekstarigita komence de la 14-a jarcento, esence temas pri renacensa religia konstruaĵo. Tamen, la turon de la preĝejo, videbla el ĉiuj anguloj de Cortegana, oni konstruis dum la 17-a

kaj 18-a jarcentoj. Ene de ĝi troviĝas religiajn objektojn el arĝento, ellaboritajn en Meksikio dum la 17-a jarcento, kaj havigitaj de Cortegana-anoj elmigrantaj en Amerikon.



Preĝejo de La Dia Savinto

### Kastelo de Cortegana.

Okaze de luktoj kontraŭ la portugala regnolando, la kastilia reĝo ordonis starigi kastelon dum la 13-a jarcento. Tamen, la ĉefturo ne finiĝis ĝis la 15-a jarcento. Kiel kuriozaĵo, oni povas diri, ke la kastelo apartenis ĝis la jaro 2006 al la Urbodomo de Sevilo, pro la fakto, ke kiam oni konstruis la fortreson, Cortegana estis vilaĝo de la Sevila Regnolando. En la jaro 2006 la urbo Sevilo rehavigis la kastelon al Urbodomo de Cortegana. Nuntempe la kastelo estas vizitebla, ene de ĝi troviĝas muzeo kaj dum la monato aŭgusto okazas ene de la kastelo mezepokaj festoj.

## Mudehara domo

Apud la fonto kie naskiĝas la rivero Chanza troviĝas modesta arkitektura trezoro. Temas pri malgranda loĝejo konstruita dum la 15-a jarcento kun tri ĉambroj. La tuta loĝejo prezentas ankoraŭ la primitivan plankon el grundo. Mebloj kaj domaj uzaĵoj tute similas al tiuj de la Mezepoko, ili estis donacitaj de la enloĝantaro de Cortegana



Mudehara domo

## **Festoj**

Dum semajnfino, meze de la monato junio, okazas la Pilgrimado de Sankta Antono. Vendrede oni transportas la standardon de la Kunfrataro de tiu sanktulo de la paroĥa preĝejo ĝis preĝejo meze de la kamparo. Sabate kaj dimanĉe, pilgrimantoj organizas festojn kaj nokte ili faras ĝoj-fajrojn ĉirkaŭ la preĝejo. Dimanĉe la standardo denove revenas en Cortegana-n.

Meze de aŭgusto okazas mezepoka festo ĉe la kastelo. Dum tiu festo enloĝantaro partoprenanta en la festaj agadoj vestas sin per mezepokaj vestaĵoj, kiel princinoj, nobeluloj, vasaloj ktp. Oni organizas ankaŭ mezepokan merkaton, tie estas eble aĉeti kaj gustumi naturajn produktojn de tiu zono.

## **Gastronomio**

Kvankam la ĉefa rimedo de Cortegana estas la ellaborado de porkaĵoj, la gastronomio de la vilaĝo ne baziĝas ekskluzive sur tiu besto. Estas eble trovi receptojn, kiel la "Vintra Gazpaĉo", kie ĉefrolas terpomoj, koriandro kaj porka hepato. Same, la "Bonodora Supo", ellaborita kun aromherboj.

Dumsomere, oni povas manĝi "distráidos", salato ellaborita kun tomato, salo, origano kaj ajlo, al kiu aldoniĝas ŝinko. En la tuta siero de Cortegana abundas ĉapel-fungoj, do estas eble trovi receptojn ellaboritajn per ĉi tiu delikta produkto, tiel rostitaj fungoj aŭ omleto kun fungoj.

Rilate kukojn, dum Pasko estas tipa la ellaborado de "Bollo de Pascua", tio estas pano kun anizo. Dum Kristnasko abundas familiaj renkontiĝoj kie rostitaj kaŝtanoj estas akompanitaj de likvoroj ellaboritaj hejme.



*Venontnumere Turismi en ...*

*Huelma (Jaeno)*



*Gazeto*   
 *Andaluzia*

*Ĉu vi deziras kunlabori kun  
nia revuo ?*

*Ni bonvenigas viajn artikolojn, fotojn,  
desegnaĵojn, informojn ktp.*

*Kontaktu kun: [info@esperanto.ac](mailto:info@esperanto.ac)*



*Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.*

## *Juan Antonio Torres Galán* *La majstra gitaristo*

Tiuj, kiuj antaŭ jardeko ĉeestis andaluziajn kongresojn de Esperanto, sendube memoros homon kiu, malgraŭ siajn malfacilajn korpajn malhelpojn, ne dubis partopreni en ĉiuj agadoj, debatoj, ekskursoj kaj vizitoj organizitaj okaze de kiu ajn esperantista renkontiĝo en Andaluzio. Pro sia handikapo, li moviĝadis lante kaj malfacile, tamen lia parol-kapablo estis rotunda, eĉ se li devis eldiri vortojn kun granda peno. Ni parolas pri Juan Antonio Torres Galán, konata en Esperantio kiel *Juantor*. Sevila esperantisto, lia nekredebla historio estas konata de malmultaj homoj.

Juan Antonio naskiĝis en Sevilo en la jaro 1951. Infan-aĝe, li ekigis siajn studojn pri muziko en konservatorio kiu situis tuj apud lia familia hejmo. Laŭ li mem sciigis, tiu proksima muzika lernejo agadis kiel allogaĵo por li. Poste, li komencis studi juron kaj kemion, tamen la muziko plenigis sian tutan tempon kaj energio. Pro tio, li sin dediĉis al la ludado de klasika muziko, kaj pli konkrete al gitar-ludado.



Juan Antonio Torres Galán  
1951 ~ 2024

Jun-aĝe, li jam estis eksterordinara gitaristo. En la jaro 1973 li atingis la Nacian Premion pri Muziko kaj en 1975 la unuan premion de la asocio "Muzika Junularo". Post studoj en la Konservatorio de Sevilo, sub la gvidado de la plej talenta hispana

gitar-ludistino, Pilar América Martínez, li pliigis siajn studojn ĉe Andrés Segovia kaj Regino Sainz de la Maza, la plej famaj tiuepokaj hispanaj gitaristoj. En tiuj jaroj Juan Antonio kontaktis kun la plej gravaj hispanaj muzikoj kaj komponistoj, tiel en 1975 en Santjago de Kompostelo, li premiere ludis la verkon *"Kvinteto por gitaro kaj kord-instrumentoj"* de la sevila komponisto Manuel Castillo.

En unu el tiuj vojaĝoj por koncerti, ĝuste la 28-an de marto 1977, li stiris aŭtomobilon en la itala regiono Sieno. Tiam, lia veturilo koliziis kontraŭ kamiono, kiu haltiĝis meze de la vojo. La akcidento estis terura, akompananto mortis, Juan Antonio suferis gravegajn vundojn. Kuracistoj sciigis al familianoj, ke la espero savi lian vivon estis preskaŭ nula.



Juan Antonio Torres Galán salutita de la reĝo Johano Karlo la 1-a, tiama princo, okaze de la livero de la Nacia Premio pri Muziko en la jaro 1973.

La vivo de Juan Antonio pleniĝis je koncertoj kaj gitar-ludadoj kaj ne nur sur scenejoj, konata estis lia pertrajna vojaĝo de Sevilo en Barcelonon akompanita de Javier García Pelayo, la plej grava muzik-produktisto de la tiel nomata andaluzia rok' dum la 1970-aj jaroj. Dum la tuta vojaĝo, sur trajno, Juan Antonio ludis klasikan repertuaron per sia 9-korda gitaro.

Juan Antonio Torres kuŝis en hospitalo dum 16 monatoj, poste kelkaj jaroj da fizika rekapabligo. Hemiplegio paralizis la duonon de lia korpo, li neniam plu povus ludi gitaron. Lia patro, agento ĉe asekur-kompanio, asekuris liajn manojn kontraŭ korpodifektiĝoj, pro tio li povis vivi sen ekonomiaj problemoj, malgraŭ la perdo de sia ĉefa viv-rimedo.

Juan Antonio neniam perdis sian rideton, sian ĉarman personecon kaj sian intensan spiritecon. Li regis la francan kaj la anglan lingvojn, tiam li troviĝis kun Esperanto, lingvo kiun li lernis sufiĉe bone.

Torres), kies ĉefa celo estas helpi kaj apogi tiujn junulojn, kiuj komencas koncerti gitarlude. Tiel, laŭ Juan Antonio mem deklaris okaze de disdonado de premioj en tiu asocio: "Estas kultura devo subteni la muzikan



*Juan Antonio*


Vizito al Medina Azahara okaze de la 13a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Kordovo 2013.

Juan Antonio tuj kontaktis kun la E-asocio de la urbo Seviljo kaj kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Li fariĝis ofta partoprenanto en ĉiuj kongresoj kaj renkontiĝoj. Malgraŭ siaj fizikaj malfacilaĵoj kaj parolkapablo, li ne dubis partopreni en debatoj, ekskursoj ktp. Verdire li estis aktiva kunlaboranto en la E-movado en Andaluzio.

Rilate muzikon, antikvaj kunuloj kaj admirantoj renkontiĝis en asocio fondita en la jaro 2007, kun la nomo "Asociación de Amigos de la Guitarra. Juan Antonio Torres" (Asocio de 32 Amikoj de Gitaro. Juan Antonio

kaj gitaran tradiciojn, kiujn nia historio postlasis al ni". En la jaro 2011 oni prezentis kompaktan diskon, eldonita de la Sevilja Deputistaro, kun la titolo "Sueños de una Juventud" (Revoj de Juneco). Tie estas eble aŭskulti gitarludajn pecojn de Juan Antonio Torres okaze de koncertoj en Seviljo, Arundo, Madrido kaj Majorko dum la jaroj 1975 kaj 1976, kiam li estis apenaŭ 24-jaraĝa.

Juan Antonio Torres Galán forpasis en Seviljo la pasintan 26an de oktobro de 2024. Elstara muziko, majstragitaristo, korplena esperantisto. Li pace ripozu!




<https://music.apple.com/es/album/sonidos-de-una-juventud/447445009>



## Esperanto, ponto inter popoloj



Ponto en Alhama de Almería (Almerio).  
Inaŭgurita en la jaro 1807.



$$E = mc^2$$

*Scienca Angulo*

*Ni estas pli honestaj ol  
ni mem konsideras*

Esploro ellaborita kune de sciencistoj de la universitatoj de Zuriko en Svisio, kaj Miĉigano kaj Utaho en Usono, pruvis, sendubite, ke homoj estas pli honestaj ol oni ĝenerale konsideras.

La eksperimento baziĝis sur *ne-vola* perdo de biletoj kie, krom kvanto da mono, enestis identigilo de la proprietulo, ŝlosiloj, kredit-kartoj ktp. Do, kiu hazarde trovis ĝin, li havis ĉiujn necesajn detalojn por trovi la proprietulon de la perdita posedaĵo.



Entute, oni *perdis* 17.000 biletojn en 355 urboj de 40 landoj. Tiuj objektoj estis lasitaj ĉe stacidomoj, bankoj, hoteloj ktp.

Laŭ unua *logika* konsidero, trovo de kvanto de mono, eĉ se malgranda, povas helpi la ekonomion de la trovanto. Do, oni supozis unuavide, ke malmultaj biletoj estus redonitaj, konsidere, ke sur ili aperis sufiĉe legeblaj la datumoj de la proprietulo.

Tamen, surprize, oni konstatis, ke des pli alta kvanto da mono jus pli eblecoj ricevi la perditajn biletojn. Tiel, tiuj ujoj enhavantaj proksimume 14 usonajn dolarojn -kvankam por la eksperimento oni uzis ĉiam lokajn biletojn-, la proporcio de redonoj estis proksimume 51%. Sed, kiam la mon-kvanto plialtiĝis ĝis preskaŭ 100 dolaroj, tiuj redonoj ankaŭ pli altiĝis ĝis 72%. Kial? Supozeble, pli granda kvanto da mono estus pli alloga por trovanto!

Laŭ esploristo de la Universitato de Zuriko, tio okazas pro la fakto, ke homoj preferas vidi sin mem kiel honestulojn, ne kiel ŝtelistojn. Do, se iu trovas biletojn kun sufiĉe granda kvanto da mono kaj li decidas alpropiigi ĝin al si, lia menso devas adapti sian propran bildon, tio estas pasi de honesta homo, kaj ni ĉiuj

konsideras nin mem kiel honestulojn, al ŝtelistoj. Tiu opini-ŝanĝo havus fortan psikologian koston. Tamen, ĉi tiu mem-rigardado kiel honestuloj ne estas la sola kaŭzo de la redono de la perditaj objektoj. Laŭ esploristoj, homa bonvoleco estas ankaŭ konsiderinda faktoro, eĉ se oni opinias ke tiu kvalito apenaŭ ekzistas en nia nuntempa mondo.

Ĉi tiu aserto pruviĝis en la redonoj de tiuj biletoj kie enestis ankaŭ ŝlosilaro. Tiel, laŭ la esploristoj de la studo, mon-kvanto ĉiam estas ege bonvena, sed kio okazas rilate ŝlosilon? Trovanto atingas neniu profiton de tiu perdita objekto.

Tamen, la proporcio de redonoj de biletoj kun ŝlosiloj estis ege pli altaj, ol tiuj kiuj gardis nur monon. Laŭ la esploristoj, tio ŝuldiĝas al la fakto, ke la trovanto konsideras, ke kiuj perdis ŝlosilojn, suferis grandan damaĝon, ofte eĉ pli granda ol simpla perdo de kelkaj biletoj. Do, trovanto de ŝlosilo emas rehavigi ĝin al proprietulo, ĉar li metas sin ene de la haŭto de la perdanto.

Resume, ni estas pli honestaj ol ni mem pensas. La studo proponas al la registaroj ne investi monon en ilaro por kontroli la agadojn de la civitanoj. Male, ili sugestis elspezi monon en programoj por instrui, kaj se necese, rememorigi, civilajn valorojn.

## *Humuro*



*Forgesu tiun ideon lerni lingvojn !  
Vi devas lerni silenti, tio ja estas multe pli efika.*



# *Flamenko*

## *Zorongo*

Laŭdire, Zorongo ne estas ĝuste flamenka stilo. Ĝi aperis dum la 18-a jarcento en Andaluzio, unue kiel danco, poste granadaj ciganoj en Sakromonto propigis al si ĉi tiun stilon, kaj ĝi iamaniere flamenkiĝis.

La nomo Zorongo devenas de unu el la plej famaj kantaĵoj en tiu stilo, kie oni ripetis kelfoje tiun vorton. Zorongo signifas "karulo, mia kara". Ĝenerale temas pri kantaĵoj pri amaj temoj kie la ĉefrolulo, ofte virino, arde deziras la amon kaj kompanon de sia amato. Eble pro tio, se temas pri dancaĵo, Zorongo estas plena je sensualeco kaj pasio.

Rilate la ritman strukturon de Zorongo, ĝi konsistas el tri klopoj kaj kelkaj gitaraj fiorituroj kun refreno kelfoje ripetata. Kaj rilate al dancado, ĝi estas tre vigla, kun kunordigitaj movoj kaj ankaŭ haltoj, pro la fakto, ke la rapideco de la kantado ŝanĝiĝas.

El historia vidpunkto, Zorongo estis ofta kantaĵo ĉe flamenkaj renkontiĝoj dum la 19-a jarcento. Sed en la 20-a ĝi preskaŭ malaperis, aŭ pli bone dirite, ĝi integriĝis ene de aliaj flamenkaj stiloj.



Tamen, la plej konata zoronga kanto estis verkita en la jaro 1931, kiam la granada poeto Federico García Lorca verkis zorongon por la kantistino Encarnación López, pli konata kiel *La Argentinita*. La poeto mem kaj la kantistino registris ĉi tiun kanton sur gramofondiskon en tiu jaro.

Ĉi tiu muzik-peco vere famiĝis, tiel la komponisto Manuel de Falla enmetis ĝin en kelkajn verkojn.

Kaj rilate la Zorongon de Federico García Lorca, jen agrabla surprizo. Miguel Fernández, konata esperanto-poeto de Granado, tradukis tiun verkon

kaj li eĉ kantis ĝin okaze de televid-programo en CanalSur -televida kanalo en Andaluzio-. Ni invitas al Vi aŭskulti lin ĉe:



<https://www.youtube.com/watch?v=s5fZH5ylnh4>

*La manoj de mia amo  
mantelon por vi nun brodas  
kun la pelerino akva  
kaj kun bordero levkoja.*

*Vi kiel fianĉo rajdis  
ĉe l' blankaj printempoj foraj.  
La hufoj de la ĉevalo,  
kvar plorĝemoj arĝentsonaj.*

*La lun' estas eta puto,  
floroj tute ne valoras,  
ja valoras viaj brakoj  
brakumante min, dum noktas.*





# *Fervojista Angulo*

## *La Trajno de la Panistoj*

[fervojista@esperanto.ac](mailto:fervojista@esperanto.ac)

<https://hafe-19.websself.net>


En la jaro 1872, oni proponis la komunikon de la urbo Sevilo kun la fervoja linio kiu unuigis Malagon kaj Kordovon, kaj de tie en Madridon. La celo estis konstrui linion trapasantan la vilaĝojn Alkala-de-Gvadajro, Karmono, Eciĥo kaj Montiljo, ĉi tiu lasta vilaĝo en la kordova provinco. La konstruo de la tuta linio okazus laŭgrade, tiel, en la jaro 1873 estis inaŭgurita fervoja linio inter Sevilo kaj Alkala-de-Gvadajro. La vagonaro vojaĝanta ĉiutage tra tiu fervoja linio ricevis la nomon *"la trajno de la panistoj"*.

Tiuepoke, la vilaĝo Alkala-de-Gvadajro estis konata kiel "Alkala-de-la-panistoj", pro la sennombraj panejoj tie ekzistantaj, kiuj, laŭdire ellaboris la plej bonan panon en la tuta Andaluzio. La trajno ricevis tiun nomon pro la fakto, ke ĉiumatene alvenis en la stacidomon dekoj da panistoj kun la celo transporti la ellaboritan panon en Sevilon. Tie, la pano estus amase disvendita. Do, oni povas diri, ke la panistoj de Alkala-de-Gvadajro provizis la urbon je pano pere de ĉi tiu vagonaro.



Finiĝas la vojaĝo en Sevilo, pano-vendistoj kun iliaj azenoj eliras el la vagonaro.

Tuj post eliri el la stacidomo, la vagonaro eniris en 100-metran tunelon sub la mezepoka kastelo de la vilaĝo. Distanco inter Sevilo kaj Alkala-de-Gvadajro apenaŭ estis 15 kilometroj. Ĉiuj panistoj revenis je la 15-a horo, ofte multaj infanoj atendis ilin ĉe la stacidomo por ricevi panajn restaĵojn ne venditajn en Sevilo.



Antikva bildo de la trajno de la panistoj ĉe la stacidomo de Alkala-de-Gvadajro.

Kelkajn jarojn poste, kaj laŭ la unuaj projektoj, la fervoja linio plilarĝiĝis je 42 kilometroj.



Komence de la 1970-aj jaroj, unu el la lastaj vojaĝoj kun azenoj ŝarĝantaj panon en la vagonaro de la panistoj.

Tiel, oni komunikis la urbon Sevilon kun la vilaĝoj Karmono. El-Viso kaj Maireno. La celo estis daŭrigi la linion poste ĝis Eciño, tamen neniu plia kilometro estis konstruita en ĉi tiu linio.

Ĉi tiu fervojo funkciis ĝis la jaro 1965, tiam ĉesis la komunikoj inter Karmono kaj Sevilo pere de trajno, tamen la fervoja linio inter Alkala kaj Sevilo ankoraŭ restis ĝis la jaro 1975. En tiuj jaroj, vojaĝoj pere de aŭtobusoj estis pli oftaj kaj rapidaj, do aŭtoŝoseo anstataŭis fervojon.

Eĉ kelkaj jarojn antaŭ la definitiva ĉeso de la fervojo, panistoj jam ne uzis tiun transportilon por provizi per pano la urbon Sevilon. Anstataŭ reloj de fervoja linio hodiaŭ estas eble trovi longan avenuon, kiu ricevis la nomon "Trajno de la Panistoj".

Rilate la vagonarojn mem, ekzistis vagonoj por vojaĝantoj kaj por varoj. Ĉi tiuj lastaj estis malfermitaj, ĉar azenoj kun korbegoj plenaj je pano eniris rekte en tiujn vagonojn. Kiam vojaĝo finiĝis ĉe la stacidomo de Enramadilla en Sevilo, panistoj kaj liaj azenoj eliĝis el la trajno kaj ili disvastiĝis tra la tutaj sevilaj kvartaloj.

Ili forlasis la Teron por  
eskapi el atom-milito... kaj  
nun, post kvincent jaroj ...

# ili revenis



Karaj geomikoj, jen ĝi.  
La planedo, kiun ni celis  
dum 9-jara  
vojaĝo.

Albo, ĝis la momento  
kiam ni surteriĝos,  
rakontu al ni, kial ni  
vojaĝas en nian  
propran planedon.

Kompreneble jes, Zak! Ĉi tiu planedo, kiu nun  
aperas sur la ekrano, antaŭ 500 jaroj estis la  
hejmo de nia prapatraro. Tie loĝis antikva  
civilizacio, kies vivo estis plena je konstantaj  
militoj.



*Malgraŭ tiom da kruelaĵoj, civilizacio progresis. Sciencaj antaŭeniĝoj okazis, tamen dum unu el la militoj...*

Samlandanoj! Ni sukcese kontrolis la atom-enerĝion!

Ni uzu ĝin por meti finon al ĉi tiu milito!



*Tamen, la uzo de atoma energio en la militoj provokis nur masakrojn kaj kompletan ruinigon.*



*Eble pro tio, timo al uzo de atoma bombo provokis unuamomente ĉeson de multaj militoj. Tamen paco ne alvenis, ĉar homaro vivis ĉiam sub la minaco de nova milito.*

Ni devas disvolvi novajn kaj pli potencajn atom-bombojn.



*Stretteĉo en la internaciaj rilatoj estis okulfrapa. Reciproka detruo ŝajnis ne-evitebla. Pro tio sciencistoj decidis interveni...*

Karaj kolegoj:  
Ni disvolvis la atoman energion, tamen ni devas eviti la uzon de atoma bombo.  
Ni devas fari ion!



Se nova monda milito okazas, la komuna detruo de la homaro estas certigita. Kion fari? Ni organizu ekspedicion kun la celo forlasi la planedon.

Jes!  
Ja!

Profesoro Klautz! Vi estas sperta pri kosmaj vojaĝoj.


Jes! la ideo estas ebla. Kosma ekspedicio kun la celo savi la plej eminentajn cerbojn de la homaro estas tre konvena.



Mi proponas organizi kosman ekspedicion en alian planedon, por konstrui pacan mondon sen militoj.



**Tiam, komenciĝis la konstruo de spaco-ŝipo, ege granda, tie povus vojaĝi kaj loĝi preskaŭ mil homoj.**



Grandega laboro, profesoro! Kiun planedon vi celos?

Ni vojaĝos en la planedon Eliron, en la galaksio Sirio.

Sed vi bezonas centojn da jaroj por iri tien.

Ĝuste kvarcent jaroj, se ni vojaĝas je 130.000 kmoj/hore.

Do, vi neniam konos vian celon.

Certe, ni neniam konos tiun planedon. Tamen ene de la spaco-ŝipo vojaĝos nia idaro.

Kaj alvenos la tago, kiam nia idaro konos tiun planedon, kaj ili estos la konstruantoj de tiu civilizacio, kiu kapablos vivi en paco, sen militoj. Ili realigos niajn revojn.

**Fine, la spaco-ŝipo estis konstruita. Sciencistoj provizis ĝin per la plej modernaj instrumentoj.**

**Ili plenigis la ŝipon per teknikaĵoj, komputiloj, libroj, diskoj... ĉio necesa por gardi siajn konojn.**

Estos eble krei ene de la spaco-ŝipo propran atmosferon.

Kaj eĉ bredi bestojn kaj kultivi plantojn.

Sciencistoj kaj iliaj familioj komencis alveni, profesoro.

Bonege! Ni foriros kiam ĉio estos preta.

*La spaco-ŝipo baldaŭ pleniĝis. Ĉiuj vojaĝantoj  
konsciis, ke ili pasos sian tutan vivon ene de la ŝipo.  
Ili neniam konos sian celon.*



Ĉio preta!  
Kvar, tri, du  
unu, ek!!

*La atom-energiaj motoroj de la spaco-ŝipo  
ekfunkciis, ili ekflugis.*



Ni  
foriras!

*La eksplod-bruo estis aŭdata je ĉirkaŭ cent kilometroj.  
Poste, iom post iom, ĉio normaliĝis.*



Survojen !

*Baldaŭ, la ŝipo ekatingis po 130.000 kmoj  
hore.*

Ni forlasas la gravitan kampon.



*Ili trapasis konatajn planedojn...*

*survojen en la planedon Eliron,  
en la galaksio Sirio.*



Ĉu la celota  
planedo estas  
simila al la  
nia?

Jes!  
Pro tio ni  
elektis ĝin.



*Ili komencis sian vojaĝon.  
Ĝi daŭris 400 jarojn.*

Sed, ni bezonis  
nur 9 jarojn  
por reveni.

Jes, Zak.  
Por reveni  
ni vojaĝis je  
186.000  
kmoj/  
sekunde!



Pro tio, ni ne povis reveni antaŭe.

Ni vojaĝis je lumrapideco, pro tio nia reveno estis multe pli rapida.

Rakontu pli, Abo. Kio okazis dum tiu 400-jara vojaĝo?

Nu, Zak! Generacioj naskiĝis kaj mortis.

*Dum la 400-jara vojaĝo sciencistoj rakontis al sia idaro la celon de la eliro.*

Ni sukcese konstruis pacan socion ĉi tie ene de la spaco-ŝipo

Mi timas, ke ni trovos nenion sur nia patrina planedo, se okazis atoma milito.

Pro tio nia prapatraro forlasis la planedon. Eble, ili ne dezirus nian revenon tien.

*Tiel, dum 400-jara vojaĝo kaj pli ol 100 generacioj, ilia prapatraro atingis la planedon Eliron. Tie, ili ekkonstruis pacan mondon.*

Ĉi tie la montoj estas plenaj je mineraloj.

Atentu! Ni ne rajtas elĉerpi ilin. Ni devas konservi ilin por ontaj generacioj.

*Kaj kvankam uranio estis trovita, ĝi estis uzata por pacaj celoj. Vivo disvolviĝis sur la planedo Eliro ĉe la galaksio Sirio.*

Kaj post multaj jaroj, ili eltrovis la fundamenton de la luma energio. Do, estis eble vojaĝi je la lum-rapideco.


Nu, ni jam alproksimiĝas. Estas eble vidi montojn kaj riverojn.



**Finfine, la ŝipo surteriĝis meze de granda urbo.**

La etoso ŝajnas esti konata de ni.

Jes! Mi vidas tion.



Ŝajnas, ke la historioj rakontataj de niaj patroj okazas nun ĉi tie.

Do, ĉu tio signifas, ke ili atingis neniun progreson dum la lastaj 400 jaroj?



Nu, tio ne eblas. Surteriĝu ĉi tien!



**La spaco-ŝipo surteriĝis meze de strato, plena je aŭtomobiloj kaj promenantaj homoj.**

Nekredeble! ili estas multe pli grandaj ol ni.

Nekompreneble!



Ĉiuj alproksimiĝis ĉirkaŭ la ŝipon por vidi la malgrandajn navigantojn.

Aŭkultu, Albo! Ili uzas strangan lingvon.

Mi uzos mallongajn frazojn.



**Albo trovis neniun problemon kompreni la elementan lingvon kaj frazaron de la popolo. Li tuj kapablis konversacii kun sciencisto.**

Mi ne komprenas Albo! Nia civilizacio aĝas malpli ol 200 jarojn.

Tamen, nia prapatroj lasis ĉi tie civilizacion antaŭ pli ol 400 jaroj.



Tio ne eblas! Nia geologoj trovis, ke en tiu tempo nia planedo estis sen-viva.

Do, tio pravas ke finfine okazis atoma milito, kaj vivo malaperis!



Do, ĉu vi diras, ke en nia prahistorio ekzistis civilizacio tute simila al la nia, kiu malaperis post atoma milito? Ĉu vere?

Jes, profesoro! Tio mem okazis.

Sed, ĝuste nun tiun saman riskon ni travivas.

Tio signifas, ke vi ne progresis multe.

Kara Albo! Evidente historio ripetigas.

Jes, profesoro. Pro tio ni devas jam foriri.

Bonŝancon! Espereble vi povos haltigi tiun detruon. Miaj prapatroj ne sukcesis.

Ĝis, amiko!

*Meze de universitata areo, la spaco-ŝipo ekflugis. Ĝi perdiĝis ĉe la ĉielo.*

Historio ripetigas, Zak!

Jes, ĉi tiu Tero estas simila al tiu pasinta.

*Dume, ĉe la profesoro...*

Jes, profesoro?

Kunvoku ĉiujn elstarajn sciencistojn! Mi devas proponi ion al ili.

*Kaj iom poste...*


Karaj kunuloj. Ni travivas terurajn momentojn. Atoma milito eblas. Mi proponas al vi forlasi ĉi tiun planedon kaj serĉi alian!

*Kunveno de fizikistoj*

FINO

nun ni

junularaj paĝoj



Finfine la andaluzia aŭtonoma administracio oficiale aprobis la enregistron de nia asocio. **Do, Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo jam estas leĝa asocio.** Rilate al la hispanlingva versio de la nomo, ni devis registri ĝin kiel "Unión Juvenil Esperantófono de Andalucía". Jes, la nomo aspektas stranga, tamen ni ne rajtis uzi la esprimon "Asociación Juvenil Esperantista de Andalucía", pro la fakto, ke tiu nomo ŝajnis identa al alia ekzistanta asocio, kvankam la Administracio ne informis al ni pri kiu asocio temis.

*AJEU ya es una asociación legalizada ante la Junta de Andalucía, así que si tienes menos de 35 años, hablas Esperanto o simpatizas y apoyas la idea de la existencia de una lengua común para toda la Humanidad, con el carácter de neutralidad, independencia y respeto a todas las lenguas ya existentes, que son características del Esperanto, te invitamos a contactar con nosotros y hacerte socio de AJEU.*

**Kontaktu kun / Contacta con:**

[ajeu@esperanto.ac](mailto:ajeu@esperanto.ac)

La Internacia Junulara Kongreso (IJK) 2025 okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto en Cisarua (Bogor) Indonezio. La kongresejo estas Alfa Resort Hotel & Conference Puncak Bogor. La oficiala temo de la renkontiĝo estas "Diverseco, solidareco, toleremo".



Diversaj prelegoj, diskutrondoj kaj atelieroj okazos ĉirkaŭ la kongresa temo. Kompreneble aliaj aferoj estos organizataj, kiel koncertoj, kulturaj prezentoj pri Indonezio, ludoj ktp. Ankaŭ estas pripensitaj la organizado de

**Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo - AJEU**

specialaj programeroj pri Indonezio kaj Sudorienta Azio, krom ekskursoj al naturo kaj la urbo, kaj enprofundiĝo en la loka kulturo.



Kvankam ni konscias, ke Indonezio estas tre, tre malproksima de Andaluzio, do partopreno de kelkaj andaluzia junulo estas tre malebla, ni invitas al Vi koni pliajn detalojn pri programo, organizado kaj kiel aliĝi al Internacia Junulara Kongreso, kun la espero, ke en venontaj jaroj IJK estus organizita ne fore de Andaluzio.

Vizitu: <https://ijk2025.tejo.org/>



¿Acabas de conocer el esperanto y te atrae la idea de aprenderlo? ¿O ya empezaste a aprender el idioma internacional y quieres dominarlo mucho mejor?

Contacta con nosotros, intégrate en nuestra asociación. Charla con otros jóvenes en esperanto por redes sociales, participa en alguna de las actividades que desde AJEU queremos organizar para el futuro, aprovecha el esperanto para viajar con más facilidad y mantener contactos en más países a través de una lengua neutral y verdaderamente internacional.

# ŜAKO

## Hispana malfermo



Unu el la plej konataj malfermitaj malfermoj, tiuj kiuj komenciĝas per 1.e4 e5, estas la hispana malfermo, kiu ankaŭ nomiĝas malfermo "Ruy López", omaĝe al Ruy López de Segura, hispana monaĥo de la 16-a jarcento, konsiderata tiuepoke kiel la plej lerta ŝakludisto. Versajne temas pri la plej malnova malfermo studata en ŝakludo, do ties uzo devas esti konata de ĉiuj kiuj deziras koni ion pli pri ĉi tiu ludo.

Kiel dirite, temas pri malfermita malfermo, do la unuaj pecoj movitaj estas 1.e4 e5. Poste, Blankoj elirigas sian ĉevalon per 2.Ĉf3, tiamaniere ili regas pliajn kvadratojn ĉe la centro de la tablo kaj samtempe nigra peono estas minacata. Kun la celo defendi ĉi tiun peonon, Nigroj ankaŭ elirigas sian ĉevalon pere de 2. ... Ĉc6. Blankoj elirigas sian kurieron per 3. Kb5. Per ĉi tiu movo, Blankoj ne nur okupas kaj minacas pliajn kvadratojn, ili samtempe preparas sian reĝon kaj turon por baldaŭa aroko.



1. e4 e5.
2. Ĉf3 Ĉc6
3. Kb5 ...

Post ĉi tiu lasta movo (3.Kb5...) ekzistas multaj eblaj sekvoj, tamen, preskaŭ ĉiuj konsideras ĉu antaŭenirigi la nigran peonon antaŭ la turo por minaci la blankan kurieron (3.Kb5 a6), aŭ ne. Ekzemple, oni povas movi 4...d6, tiamaniere Nigroj defendas sian peonon (e5). Oni povas ankaŭ antaŭenirigi la nigran kurieron por defendi la centrajn kvadratojn, tiel 4...Kc5. Aŭ la plej provokema movo, konata kiel



variante Bird, kiu ebligas fortan atakon kontraŭ la kuriero kaj kontraŭ la ĉevalo, tiel: 4... Ĉd4. Tamen, ĉi lasta movo, kvankam tre kuraĝa, tucerte provokos interŝanĝon ĉevalo x ĉevalo, kun la rezulto ke Nigraj perdos sian solan gravan pecon meze de la tabulo.


Eblaj daŭrigoj post 3. Kb5... se oni ne deziras antaŭenirigi la peonon 3...a6.



3. Kb5 d6  
Varianto Steinitz



3. Kb5 Kc5  
Varianto Cordel




3. Kb5 Ĉd4  
Varianto Bird

Tamen, la preferata daŭrigo por la nigraj pecoj, laŭ fakuloj, estas antaŭenirigi la nigran peonon antaŭ la turo por minaci la blankan kurieron, tiel: 4...a6. Temas pri la varianto Morphy. Ĉi tiu movo donas al Nigroj pli grandajn eblecojn. Normale, Blankoj akceptas la interŝanĝon kuriero x ĉevalo, pro la fakto, ke se Blankoj malantaŭenigas la blankan kurieron sur a4, tio provokus perdon de iniciatemo fare de Blankoj, krom la situo de blanka kuriero sur ne-minacanta kvadrato. Ĉi tiu estas la plej ofte ludata varianto, tiel:



3. Kb5 a6  
Varianto Morphy



Se poste 4.Ka6...  
Nigroj povas antaŭenirigi  
sian kurieron ĝis 4...c5  
kun grandaj avantaĝoj.



Pli bone 4.KxĈ Pd6xK  
Estas preferinde por  
Blankoj akcepti la  
interŝanĝon kuriero  
kontraŭ ĉevalo.



# Andaluza Kuirarto

## Terpomoj kondimentitaj laŭ la kadiza stilo

Se vi iras en la provincon Kadizon, vi trovos en kiu ajn trinkejo ĉi tiun modestan sed bongustegan apetitigaĵon, ĉiam akompanita de freŝa biero. Verŝajne temas pri tre simpla recepto, tamen la rezulto estas nekredeble bona, kvankam ekzistas kelkaj esencoj necesaj por ties ellaborado.

Temas pri terpomoj kondimentitaj laŭ la stilo de la provinco Kadizo, kvankam verdire ili estas troveblaj en la tuta Andaluzio.

### Jen la ingrediencoj por 4 homoj:

- Terpomoj, 3 aŭ 4 mezgrandaj. Pli malpli 600 gramoj entute.
- Ŝenoprazo 150 gramoj.
- Petroselo.
- Oliv-oleo, 150 ml.
- Vinagro, 2 kuleroj.
- Salo.
- Tinuso (karno de la ventro).
- Malmole kuirita ovo (2)




Terpomoj



Salo



Petroselo



Ovoj  
malmole kuiritaj




Oliv-oleo



Vinagro



Ŝenoprazo



Karno de la ventro  
de tinuso

### Jen la preparado:

1) Purigu tre bone la terpomojn per abunda kaj kuranta akvo. Atentu, ne senŝeligu ilin. Kiam ili estos tute puraj, tio estas sen grundo, kuiri ilin en potu plena je akvo dum 20-30 minutoj. Aldonu en la akvo iomete da salo.



2) Post la kuirado, senŝeligu la terpomojn. Ili devas esti ankoraŭ iomete varmaj. Jam senŝeligitaj, tranĉu la terpomojn, laŭ kvadratoj aŭ runde, ĉiu peco devas esti sufiĉe larĝa.



3) Dispecigu petroselon kaj ŝenoprazon.



4) Aldonu la petroselon kaj ŝenoprazon sur la terpomojn, ĉi lastaj ankoraŭ devas esti iomete varmaj.



5) Spicu ĉion per salo kaj verŝu olivoleon kaj vinagron.



6) Movu milde la tutajon. La terpomoj ne devas esti disbatitaj.

7) Aldonu la ovojn malmole kuiritajn kaj la tinuson. Prefere aĉetu karnon de la ventro de tiu fiŝo.



Kiam la terpomoj malvarmiĝos, (neniam ene de frigujo), akompanu ilin per freŝa biero!

***BONAN APETITON!***



## *Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio*

### *"La Granadaj Infantinoj"*

La reĝo Mohamedo la 9-a regnis komence de la 15-a jarcento en la islama regnolando Granado, en Andaluzio. Li estis konata kiel "al-Aysar", kies traduko estas "la maldekstra-manulo". La reĝo rilatis kun kristana kaptitino kaj ŝi naskis triĝemelinon. Ĉar temis pri ofta kutimo ĉe la reĝa kortego, Mohamedo decidis konsulti al astronomo kun la celo koni la estonton de tiuj filinoj post la naskiĝo. La astronomo respondis:

*"Ho, lia Moŝto! Viaj tri filinoj bezonas viajn protekton kaj prizorgon, ĉefe kiam ili estos junulinoj pretaj por edziniĝi".*

La reĝo Muhamado pensis, ke tiu danĝero, kvankam ankoraŭ tre malproksima, devus esti evitata kiel eble plej baldaŭ. Do, li sendis siajn filinojn en la vilaĝon Salobrenjon, ankaŭ en la Granada regnolando. Tie, li posedis grandan turon, kie la tri filinoj povus loĝi trankvile, lukse kaj sen-danĝere, kune kun sia patrino, la kristana kaptitino Kadiga, kvankam verdire, la tri filinoj estus tie enprizonigitaj.



Kvankam la tri filinoj naskiĝis en la sama akuŝo Zajda estis konsiderata kiel la plej aĝa, ŝi estis kuraĝa kaj eĉ temerara. Zorajda estis belega kaj Zorahajda, la plej juna, estis timema kaj ekstreme sentema. La turo, kie ili loĝis, estis konstruita sur rokego fronte al maro. El tie, ili vidis alveni ŝipoj kun varoj kaj ofte ankaŭ kun kristanaj kaptitoj okaze de la konstantaj militoj inter kristanoj kaj islamanoj dum tiuj jaroj en Andaluzio.

Iam, Zajda, kiam ŝi rigardis atente el unu el la fenestroj de la turo, vidis ĵus alvenintan boaton. Sur ĝi, granadaj soldatoj kondukis tri kristanajn prizonulojn. Baldaŭ Zajda surpriziĝis kaj ŝi alvokis siajn du fratinojn.

*"Vidu ilin! Kvankam ili estas ŝarĝitaj je ĉenoj, ĉu estas eble trovi junulojn pli belajn ol tiuj? Ili estas arogantaj, fieraj kaj nobelaj!"*

Zajda kaj ŝiaj fratinoj rakontis al sia patrino Kadiga tion, kion ili vidis. Tiam, Kadiga memoris la antaŭdiraĵon de la astronomo kiam ili naskiĝis. Tiel, ŝi sendis mesaĝon al la reĝo en Granado por sciigi lin, ke jam alvenis la momento antaŭdirita de la astronomo. La reĝo Muhamado decidis alvenigi la tri filinojn sub sia protekto. Kiam la filinoj prezentiĝis antaŭ li, la reĝo diris:

*"Vi estas dezirindaj kiel fruto de ĝardeno. Do, mi agados kiel drako por gardi vin."*



Iam, la tri filinoj rajdis apud sia patro, kiam alproksimiĝis sur la vojo grupo de kaptitaj kristanoj. Ĉar la reĝo pasus apud ili, soldatoj ordonis la kaptitojn ne levi la kapon por rigardi lian moŝton. Tamen, tri el la kaptitoj,

fieraj kristanoj, ne obeis, ili rekte rigardis la vizaĝon de la reĝo. Muhamado, kolerigita, elingigis sian glavon kaj emis mortigi ilin tie mem. Tuj, la tri filinoj agnoskis tiujn tri kaptitojn, ili estis tiuj, kiujn ili miris el la turo de Salobrenjo, do, la tri filinoj petis la indulgon el sia patro rilate la tri kristanajn kaptitojn. La reĝo akceptis la peton, sed li ordonis malliberigi ilin ene de turo ĉe Alhambro, la reĝa palaco.

Dum tiuj tagoj la tri infantinoj ŝajnis malfeliĉaj, ili paliĝis. Ilia patro volis kontentigi ilin per luksaj vestaĵoj, juveloj, muziko, tamen ili estis tristegaj tagon post tago. Kadiga, ilia patrino, komprenis, ke tio, kio mankis al siaj filinoj estis la amo de tiuj junuloj, kvankam ŝi ne povis rakonti tion al la reĝo. Kadiga, pere de helpo de sklavo, atingis ke la kristanoj povu eliri el la prizono kelkajn horojn ĉiutage, por labori kiel sklavoj meze de la ĝardenoj. Tiel, la infantinoj povus vidi ilin, eĉ se malproksime.

Kadiga tuj ekkonversaciis kun ili, vere ankaŭ ŝi estis antaŭe kaptita kristanino. Okaze de tiuj paroladoj la patrino kaj la kristanoj amikiĝis, kaj tiam ili proponis al ŝi kuraĝan projekton: eskapi ĉiuj kune en la urbojn Kordovon aŭ Sevilon. Kadiga rakontis tiun proponon al siaj filinoj, kvankam vere ŝi estis maltrankviligita, ĉar se la propono estus konata de la reĝo, ŝi kaj la princinoj estus kondamnitaj je morto.

Kiam Zajda konis la planon, ŝi diris, *kaj se ni deziras eskapi akompanitaj de tiuj tri junuloj?* La du aliaj fratinoj, kvankam dubemaj, kapjesis.

Kun la helpo de sklavo, ili ekigis la planon. Li devus malŝlosi kaŝitan pordon de la reĝa palaco, kiu malfermiĝis ĉiunokte. Do, li tion faris. Pere de eskalo gardita de la tri kristanaj kaptitoj, ili situis sin piede de la turo, kie loĝis la princinoj. Unue malsupreniris la kuraĝa Zajda, poste la bela Zorajda. Kiam alvenis la momento por Zorahajda ŝi dubis. Ŝi metis sian piedon sur la eskalon, sed samtempe ŝi rigardis sian ĉambron, plenan je riĉaĵoj. Ĉe la turo ŝi sentis sin sekura, tiam ŝiaj duboj plenumi la planon akompani siajn fratinojn pliiĝis. Zajda kaj Zorajda, jam fore de la turo, petegis al sia fratino uzi la eskalon por malsupreniri, tamen ŝi tion ne faris.



Turo de la Infantinoj en la reĝa palaco Alhambro (Granado)

Patrolo kun soldatoj alproksimiĝis, tiam Zorahajdo komprenis, ke ŝi jam ne disponis je tempo por eskapi. Ŝi kriis al siaj fratinoj:

*"Foriru vi! Kaj estu feliĉaj, mi devas resti ĉi tie!"*

La tri kristanaj kavaliroj, la du islamaj infantinoj, Kadiga kaj sklavo rapide rajdis por eskapi el la reĝa palaco. Laŭdire, Kadiga falis el sia ĉevalo kiam ŝi trapasis riveron, ŝi mortis. La sklavo liberiĝis kaj la kavaliroj, kune kun la princinoj, sukcese iris en la urbon Kordovon.

Zorahajda restis en Alhambro, la granada reĝa palaco. Ŝia patro, la reĝo Muhamado, komprenis, post la foriro de siaj filinoj, la antaŭdiraĵon de la astronomo. Por eviti eskapon de la sola princino kiu restis apud li, la reĝo decidis ŝlosi por ĉiam la turon kie loĝis Zorahajda. Ŝi mortis junaĝe.

Laŭdire, ankoraŭ nuntempe, figuro ofte aperas ene de tiu turo, kiu ricevis la nomon de "Turo de la Infantinoj". Kiam ŝi aperas, estas eble vidi knabinon, kiu malfeliĉe rigardas rekte en Kordovon, tien, kien ŝiaj fratinoj fuĝis. Oni diras, ke ŝi pentiĝis pro sia dubemo, kaj ŝi ankoraŭ revas pri kio estus okazinta se ŝi akompanus siajn fratinojn dum tiu fuĝo.



	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2					■		■	
3								
4			■			■		■
5								
6			■					
7								
8			■					

## HORIZONTALALE

1. Saltanta aŭstralia marsupialo.
2. Plenumi tion, kion persono ordonas aŭ malpermesas. ■ Verba finaĵo uzata utila por ordoni. ■ Simbolo de la reelaj nombroj.
3. (*Akuzative*) Hispana regiono.
4. (*Inverse*) Sufikso esprimanta la efikon de ia kaŭzo. ■ Sufikso esprimanta pasivon dum plenumiĝo. ■ Akuzativa finaĵo. ■
5. (*Inverse*) Kolektu kaj determinu plantojn.
6. (*Inverse*) Konjunkcio esprimanta diferencon. ■ Grupo de homoj, bazita sur imagita etna komuneco
7. (*Inverse*) Ĉefurbo de Nord-Irlando.
8. (*Inverse*) Sufikso uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto. ■ Unu el la noblaj gasoj.

## VERTIKALE

- A. (*Akuzative*) Transigo de likva stato al la stato de ĝelo.
- B. Fruto kun ruĝa haŭto kaj flava karno.
- C. Maljesa. ■ Verba finaĵo. ■ Sur la aŭtomobiloj de Svedio. ■.  
Ĉ. Enorman.
- D. Verba finaĵo. ■ (*Inverse*) Antikva nomo de Betlehemo.
- E. (*Inverse*) Partiulo uzata por signifi "ne pli ol". ■ Instrumento por disfibrigi tigojn kaj forigi la senutilajn partojn.
- F. Verba finaĵo. ■ (*Inverse*) Malbono.
- G. (*Inverse*) Akronimo de organizaĵo kiu apartenas al neniuj registaro. ■  
(*Inverse*) Sledo, utiligata por rapide malsuprenliti sur glacivojo.



## SOLVOJ AL LA VORTO-LUDOJ DE LA PASINTA NUMERO

### Krucvorto.

G	E	L	A	T	E	N	O
R	I	A	D	O	■	O	N
E	L	D	O	R	A	D	O
N	A	L	■	O	T	I	M
V	■	A	L	■	O	■	Ŭ
I	N	K	■	O	B	L	E
Ĉ	O	T	E	D	O	J	N
O	S	O	D	A	R	A	P

### Rebuso.

Kiam vi konis vian edzon?

Sur la bildo aperis

- Numero  $6 + 1 \rightarrow$  *Sep*
- Meze de la numero aperas grafike la karakteriza kvalito de muzika instrumento  $\rightarrow$  *Tembro*

Do, sur la bildo aperis tembro en la mezo de sep.  $\rightarrow$

### Divenu la nomojn de landoj.

### En la mezo de Septembro

A	N	D	A	L	U	Z	I	O
r	i	a	n	i	z	a	s	m
g	k	n	d	h	b	a	l	a
e	a	l	o	t	e	m	a	n
n	r	l	r	e	k	b	n	o
t	a	a	o	n	i	i	d	o
i	r	n	o	ŝ	s	o	o	
n	a	d		t	t			
o	r	o		e	a			
	v			j	n			
	o			n	o			



Nulo

*Sur la bazo de la piramido aperas vorto, kies difino troviĝas sube. Por formi la sekvantan vorton, legu la novan difinon kaj demetu unu el la literoj. Tiel same ĝis la supra litero.*



Finaĵo uzita por kvantoj en la tabelo de simplaj voĉoj en esperanto.



Simpatia inklino al iu.



Nobela sinjorino.



Teatra verko, en kiu la tragika elemento miksiĝas kun la komika.



Sento de entuziasma ravo, rigardante iun aŭ ion aparte belan.



Grandega, nedifinita nombro.



Monumento, servanta kiel tombo por antikvaj reĝoj de Egiptujo.

# Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

## Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

### Estraro

Prezidanto / Presidente:  
Vicepresidente / Viceprezidanto:  
Sekretario / Secretario:  
Kasisto / Cajero:  
Voĉdonantoj / Vocales:

### Directiva

Ángel Arquillos López  
Alejandro Burgos Escalante  
José M<sup>a</sup> Rodríguez Hernández  
Carlos Spinola  
Juan Díaz Casado  
Alejandro Pinos Cabello  
Yousef Hamdi el Farouki

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)  
TTT-paĝo / Página web: [www.esperanto.ac](http://www.esperanto.ac)  
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: [www.esperanto.es](http://www.esperanto.es)  
Asociación Universal de Esperanto: [www.uea.org](http://www.uea.org)





# Kulturdomo de Esperanto Kastelo Greziljono

## Agendo de Eventoj junio - aŭgusto 2025

- 9a / 12a junio.  
Ekskursoj post la kongreso de Esperanto-France.
- 30a junio / 7a julio  
89a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.
- 30a junio / 10a julio  
37-a Internacia E-konferenco kaj Maratona Esperanto-kurso.
- 11a / 20a julio  
Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve).
- 21a / 31a julio  
46a Renkonto de Esperanto-Familioj.  
15a Festa semajno por infanoj kaj familioj.
- 9a / 16a aŭgusto  
98a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).
- 24a / 29a aŭgusto  
Verda Naturisma Semajno.



**1310 Route du Lude, Grésillon — 49150 Baugé-en-Anjou — Francio**  
[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)